# Se mi loĝus sola.... gramatika ekzerco

## Ĉu vi ŝatas, aŭ malŝatas loĝi sola?

Se mi **loĝus** sola, mi **povus** fari ĉion kion mi **volus.**
Mi **vojaĝus, rigardus** teatraĵojn, filmojn, **aŭskultus** koncertojn nur tiujn, kiujn mi ŝatas.
Mi **manĝus** tion, kion mi ŝatas, ne kion ŝatas mia kunulo kaj sendepende de la kutima tempo.
Mi **dormus** je diversaj horoj, kiam mi **estus** dormema, ne nur pro tio, ke estas "la ĝusta horo".
Mi ne **devus** konduti laŭ horaro kiel trajno kaj imiti aŭtomaton.
Neniu **dirus** al mi kion li/ŝi ŝatas, aŭ ne ŝatas rilate al mia konduto.

### Ekzerco Nr 1

----------------------------------------------------------

*Plenigu per la demanda korelativo.:*

<u>Ekzemple</u>: neniu **kontrolus** min dirante:

1. K....... vi iras, ĉu dancejon?
2. K........ vi ne iras teatrejon?.
3. K........ li/ŝi deziras, aŭ ne deziras de mi.
4. K........ estas por mi la plej bona, aŭ malbona.
5. K........ mi faru, aŭ ne faru
6. K........ vi ne konsentas kun mi?
7. K........ vi revenos?
8. K........ vi estos, ĉu malproksime?
9. K........ da personoj tie estos ?
10. K........ estas ĉi tiu letero, ĉu de via amanto?
11. K........ vi amas, lin/ ŝin aŭ min?
12. K........ vi laboras, ĉu precize?
13. K........ vestaĵon vi aĉetis, mantelon, aŭ jakon?
14. K........ estas viaj kolegoj, instruistoj, aŭ aktoroj?
15. K........ personojn vi konas, ĉu fidindajn?
16. K........ libron vi legas? Kio estas ĝia titolo?
17. K........ li, aŭ ŝi estas por vi?
18. K........ vi helpas al ili kaj ne al mi?
19. K........ da mono vi elspezis?
20. K........ filmon vi rigardas?. Mi ne ŝatas fabularan filmon.
21. K........ viajn familianojn vi invitis al nia hejmo, ĉu ĉiujn?
22. K........ vi povis difekti bronzan statueton?

Mi ne **devus** disputi, ĉu mi konsentas kun tio, aŭ ne dum li/ŝi atendas, ke mi cedu.
Neniu **fanfaronus** kiom unika li/ŝi estas, por ke mi admiru lin/ŝin.
Mi ne **devus** konstante aŭskulti la samajn rakontojn, sloganojn, frazojn, ripetatajn de jaroj. Li/ŝi almenaŭ ŝanĝu la vortordon en la frazoj....
Kiam iu interparolanto **enuigus** min, mi simple **adiaŭus** lin kaj **evitus.**
Mi ne **havus** la kaŭzon por kvereli, koleriĝi, ofendiĝi.
Ĉu mi **sentus** solecon? Eble jes, sed mi **dezirus** almenaŭ dum iom da tempo senti liberecon.

## Ekzerco nr 2

------------------------------------------------------------

Skribu 10 frazojn kun kondicionalo klarigantajn kial vi **ne ŝatus** loĝi sola.

Ekzemple: Mi ne **ŝatus** loĝi sola, ĉar mi timas musojn.

..............................................................................................................

..............................................................................................................

..............................................................................................................

..............................................................................................................

..............................................................................................................

..............................................................................................................

..............................................................................................................

..............................................................................................................

..............................................................................................................

..............................................................................................................

..............................................................................................................

..............................................................................................................

..............................................................................................................

..............................................................................................................

*La solvo al la ekzerco nr 1:*

1 - Kien
2 - Kial
3 – Kion
4 – Kio
5 – Kion
6 – Kial
7 – Kiam
8 – Kie
9 – Kiom
10 – Kies
11 – Kiun
12 – Kiel
13 – Kiun
14 – Kiuj
15 – Kiajn
16 – Kiun
17 – Kio
18 – Kial
19 – Kiom
20 - Kian
21 - Kiujn